


# RONA ESPERO



Cirkulero 43 por la amikoj kaj subtenantoj de "Bona Espero" r.a., prezidanto: s-ino Hedwig Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a D-48356 Nordwalde, tel. +2573/626

Nordwalde, 95-12-19

Karaj amikoj kaj subtenantoj,

longe vi devis atendi tiun ĉi cirkuleron. Ree kaj ree ni prokrastis ĝin esperante povi prezenti al vi jam posteulojn por Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia. Vane! Jen ni nur povas diri, ke la estonto de la lernejo estas ankoraŭ nebula. -

Kun granda funebro ni devas informi vin, ke la 27an de junio, iom post la fino de sia 13a vivjaro, mortis **Lidia**, sekve de tragika akcidento, pri kiu neniu kulpas, dum feriado en Braziljo. Lidia estis la 3a el 5 gefratoj, apartenantaj al la infanoj de Bona Espero, kaj vizitis la 6an klason. Ĉiuj, kiuj konatiĝis kun ŝi, scias, kiom varmkora, laborema kaj inteligenta ŝi estis. Ŝi dolore mankas al Bona Espero kaj al ni. Estas malgranda konsolo, ke ŝi rajtis ankoraŭ partopreni en la longdistanca vojaĝo al la nacia kongreso en Natal lastjare. -

Atentu nian tehnikan progreson: kiel la bildo de Lidia dekstre montras, fine eblas por ni, "punktigi" bildojn kaj tiel atingi akcepteblan kvaliton. -

Komence de aŭgusto Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia kune kun la muzikista familio De Castro vizitis nin post la Universala Kongreso en Tampere. Laŭ iliaj raportoj pluraj homoj parolis kun ili, pripensante ĉu eble transpreni la gvidadon de Bona Espero. Fakte, Brazila Esperantista geedza paro volis veni fine de novembro al Nordwalde por preparoli detalojn, sed bedaŭrinde ili devis nuligis sian planitan rondvojaĝon tra Germanujo kaj tial ankaŭ ne povis veni al ni. Do, ŝajne ges-roj Grattapaglia vole-nevole ankoraŭ dum certa tempo ne povas esti sensarĝataj de siaj postenoj.

La revuo "esperanto" aperigis artikolon kun raporto pri la vizito de multaj gravuloj en Bona Espero. Tio jes havis bonan varbefikon por Esperanto, sed ne solvis la financajn kaj laborfortajn problemojn. Tiel ni ankaŭ respondis al pluraj legintoj, kiuj demandis nin, ĉu entute Bona Espero ankoraŭ bezonas nian subtenon. -


Jen miksaĵoj el la multaj novaĵoj, kiujn ni ricevis de Bona Espero: 15 infanoj el Bona Espero prezentis la 17an de oktobro la "dancon de la naturo" en la Nacia Teatrejo en Braziljo. Certe tio estis neforgesebla evento por ili. - La 14an de oktobro la urbo Alto Paraíso okazigis kunvenon kaj ekspozicion de la "kampara virino". Okaze de ĝi oni atribuis al Ursula Grattapaglia la titolon "honora civitano". Koran gratulon! - Pri la planitaj dometoj tie sur la parceloj, kiujn donacis la urbo al Bona Espero: La domo de **Maria**, iama instruistino de Bona Espero, estas preta. Ankaŭ la dometo por **Adarci** progresas. Kvankam Adarci zorgas por sia bebo Igor kaj pluinstruas, ŝi krome transprenis post la foriro de la ĝisnuna kuirstino la kuirejon de Bona Espero. Admirinde!

**Clarimundo** ne nur sukcese trapasis la ekzamenon pri stirlicenco, sed ankaŭ tiun por eniri la lernejon de estontaj pilotoj en Braziljo. Ni gratulas! Ekde julio laboras en Bona Espero plia juna instruistino, **Patrícia** el Rio de Janeiro, kiu venis kun sia fileto **Breno**. Mia familio jam konatiĝis kun ŝi paske. Bedaŭrinde ŝi ne ricevas salajron de iu oficiala instanco. Ankaŭ **Cristina**, kiun ni prezentis en nia lasta cirkulero, surprize ricevis komunikon de la urbo Alto Paraíso, ke ili ankoraŭ ne pagas salajron al ŝi.



Nia estraro tial rapide decidis, akcepti la proponon de Giuseppe, almenaŭ pagi gratifikon al ili. Pliajn gratifikojn ricevos (krom Adarci kaj João Santana) ankaŭ "la grandaj knabinoj", **Andreia**, **Fátima** kaj **Tânja**, kiuj ĉiam devas rimarkeble kunlabori.

**João Santana**, jam ĝis nun pagita helpanto en Bona Espero, ekde 1996 ricevos regularan laborkontrakton. La estraro tre salutas tiun evoluon. Nia lasta membrokunveno komisiis nin, elspezi pli grandan kvanton de niaj financaj rimedoj por salajroj. Nur tiel ni povas esperi, teni fidindajn laborantojn dum pli longa tempo kaj per tio fine ankaŭ garantii la pluekziston de la lernejo.



La sportejo ricevis la nomon "Campo Lys" laŭ Lys de Castro. Apoga muro kaj dratŝirmilo de la sportejo estas intertempe pretaj.

La ŝirmilo malebligas, ke la pilko falas inter la fruktoarbustojn difektante ilin.

La kurenta konekso ankoraŭ ne estas instalita, sed estas indikoj, ke oni baldaŭ metos la fostojn.

La loĝejoj de Bona Espero spertis grandan ŝanĝon: Ursula kaj Giuseppe translokiĝis kun la infanoj al la nova domo, en kiu loĝis ĝis nun la instruistinoj, la dumtempaj helpantoj kaj gastoj. Do, ekzistas nova "Casa das crianças" (Domo de la Infanoj).

Patrícia kaj Andreia dum tuta semajno en São Jorge (apuda vilaĝo) ĝuis kurson, kiel utiligi la kreskaĵojn de la savano: lokaj medicinaj plantoj, florarangoj, agrikulturo ktp. kaj povas nun pludoni tiun scion al la aliaj en Bona Espero. -

Kiel statas niaj financoj? Bone, por unuvorte resumi. La grandanimaj donacoj ankaŭ ĉi-jare venis seninterrompe, tiel ke ni havas bonan rezervon por 1996, malgraŭ krompago por 1995 per la gratifikoj menciitaj supre. La jarfinkalkulo sekvas per la venonta cirkulero.

\*\*\*\*\*

Fine ankoraŭ grava atentigo: Pro la altaj kostoj ni nuligis nun ankaŭ nian poŝtkonton. Ni tial rekomendas al ĉiuj, kiuj ne loĝas en Germanujo, donaci rekte al la kontoj de UEA (vidu sube). Nepre ne forgesu, indiki la UEA-konton "bone-z" en la rubriko "ĝir-celo", ĉar nur tiam UEA scias, ke la donaco estas por tiu interna konto, nome por Bona Espero. Ĉar ni ne kontrolas tiun konton, estas krome necese, informi nin pri via donaco, se vi volas pluricevi nian cirkuleron. Sur via adresetikedo supre dekstre estas indikita la lasta jaro, en kiu ni notis donacon de vi.

\*\*\*\*\*

Nome de Bona Espero al ĉiuj donacintoj tre koran dankon! Al vi kaj al niaj amikoj en Brazilo ĉion bonan dum la venonta jaro,

*Hedvig Fischer*

Por ŝpari bankkostojn, pagu laŭeble al UEA por la UEA-konto "bone-z", sed informu nin, por ke vi pluricevu niajn cirkulerojn!  
Poŝtkontoj de Universala Esperanto-Asocio/Rotterdam:  
Belgujo: 000-1631831-97, Germanujo: Köln 3182 91-509 (bankkodo: 370 100 50)  
Nederlando: Den Haag 37 89 64, Svedujo: 74374-0; Svisujo: Genève 12-2310-0